

La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

EL LA ENHAVO

- Ĉu komuna gazeto por la nordlandaj esperantistoj? 14
Jarkongreso en Västerås 15
La kvadrato de la cirklo 18
Larmoj sur rokoflanko 21
Ideologiaj ŝanĝoj en la Esperantomovado 24
Kruevortenigmo 26


Abono 20 sv. kr.

Poŝtĝiro: SEF 20 12-3

2

1972

60-a jaro



FROSTAVALLEN

Vi jam scias, ke Frostavallen situas ĉe Höör, en la mezo de Skanio. Vi ankaŭ scias, ke Frostavallen estas idilia loko en bela, arbara regiono apud rava lageto.

En Frostavallen okazos en la nuna jaro 30.7—6.8 nova prelegsemajno, kaj prelegos D-ro Ivo Lapenna, Londono, D-ro Werner Bormann, Hamburgo, D-ro J. C. Wells, Londono, kaj S-ro Jean Thierry, Parizo. Krom tio diskutoj kaj amika kunestado en belega naturo.

Aliĝu tuj. Petu informojn de s-ro Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö, kaj sendu al li senprokraste la aliĝilon. La ĝisnuna Gästgården restas, sed krome estas tute novkonstruita hotelo (preta en 1971). Frostavallen deziras tre frue scii la nombron de la esperantistoj por povi lui al aliaj personoj.

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO

Per sia artikolo en tiu ĉi numero Franko Luin, estrarano de SEF, malfermas diskuton pri komuna esperantogazeto por la nordaj landoj. Ĉar estas la intenco, ke tia gazeto, se ĝi efektiviĝos, anstataŭigu la nunajn landajn gazetojn, multaj legantoj eble atendas, ke la nuna redaktoro de La Espero diru sian opinion pri tiu tre grava demando.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam ni sufiĉe multe diskutis tiun ideon — i. a. je la nordlanda kongreso en Oslo — mi estis relative entuziasma por la afero. Se mi nun estas pli skeptika, tio ne dependas de tio, ke mi mem nun redaktas La Esperon, sed eble de tio, ke mi pli profunde pensis, pensadis, pri la problemoj kaj konatiĝis al la malfacilaĵoj. Antaŭ ĉio mi komencis cerbumi pri la celo de tia gazeto.

S-ro Lennart Aberg, kiu iam forte argumentis por komuna nordlanda gazeto, kutimis emfazi, ke la esperantomovado estas **internacia**, sed ke ni tro limigas nian agadon laŭ nia kutima nacia pensmaniero: ni havas landajn asociojn, lernolibrojn apartajn por ĉiu lando, landajn eldonejojn, landajn gazetojn.

Kvankam ni ĉiam devas strebi al pli granda internacieco, ni verŝajne tamen pro multaj kaŭzoj, i. a. ekonomiaj, devas agi laŭ landaj kadroj. Sed, se oni tion konstatas, kaj se oni ankaŭ kredas, ke la landaj esperantogazetoj plenumas taskon kiel informiloj kaj instigiloj por la esperantistoj en la respektivaj landoj oni devas demandi al si, ĉu estus saĝe krei gazeton, kiu estus nek landa nek vere internacia. Ĉu ne estas risko, ke ni nur kreus novan **internacian** gazeton, kiu konkurencus kun la jam ekzistantaj?

Sekve mi tute konsentas kun Franko Luin kiam li diras ke la nova gazeto devus doni ion pli ol la nunaj gazetoj donas. "Ŝanĝi sen scii, ke la ŝanĝo alportos ion novan, estus absurde." Kaj Franko Luin ja alportas ion novan al la diskutado; li volas havi gazeton, en kiu okazas iaspeca idea debato pri la rolo de la esperantomovado, pri la rilatoj inter nia movado kaj la grandaj sociaj problemoj de la mondo.

Estas eble, ke tia diskutado estas kaj dezirinda kaj necesa. Sed jam Zamenhof spertis, ke la esperantistoj de lia generacio grandparte timis pro tiaj diskutoj. La demando estas, ĉu ni kiuj nun vivas estas pli maturaj!

Franko Luin

Ĉu komuna gazeto por danaj, finnaj, svedaj kaj norvegaj esperantistoj?

Depost pluraj jaroj oni diskutas, ĉu kunigi la organojn de la nordlandaj esperanto-asocioj: La Esperon, Danan Esperanto-Bultenon, Norvegan Esperantiston. Iam oni devos ĉesigi tiujn diskutojn — aŭ per starigo de komuna gazeto aŭ per decido, ke tia gazeto ne estas dezirata.

Se oni faros komunan gazeton, ĝi estos komuna por la esperantistoj en Danlando, Finnlando, Norvegio kaj Svedio. En ĉiuj ĉi-landoj aperas hodiaŭ esperanto-gazetoj. Se oni rigardas ilin oni tuj rimarkas ion komunan: ili estas malgrandaj — kun malmulte da enhavo, malmultaj legantoj. La Espero estas la ioma escepto en tiu ĉi kazo, ĉar SEF estas la plej granda el la asocioj.

Se ni decidus havi komunan gazeton, ni antaŭe pripensu la rolon de ĝi. La rolo, kiun la nunaj gazetoj havas estas pasiva rolo: ili registras tion, kio okazis kaj okazos.

LINGVO — KULTURO — SOCIO

Antaŭ ol mi daŭrigas, mi malfermos parentezon: En la junulara esperanto-movado, ĉefe en TEJO, okazis dum la lastaj jaroj sufiĉe grandaj diskutoj pri la rolo de esperanto. Tiuj diskutoj estas iom nekonataj en aliaj rondoj ol junularaj. Ni scias, ke esperanto estas la solvo de la lingvo-problemo, kaj ni ankaŭ scias, kio estas la lingvo-problemo.

En la ĝisnunaj diskutoj pri la rolo de esperanto ni diskutis lingvojn kiel fenomenojn por si mem. Sed ĉu eblas diskuti pri lingvoj por si mem? Ĉu ne lingvo estas parto nedissirebla de kulturo? Lernolibro pri la angla estas samtempe lernolibro pri la angla kulturo. Lernolibro pri la vivmaniero de la brita meza klaso. Lernolibro pri la franca kulturo kaj pensmaniero. Kiam oni lernas lingvon, oni lernas kulturon. Kaj siavice, kulturo estas parto nedissirebla de socia vivo kaj de sociaj moroj kaj kutimoj.

En la junulara movado oni diskutas pri la interrilatoj lingvo-socio-kulturo. Oni venis al la konkludo, ke se oni estas kontraŭ la superrego de unu nacia lingvo super la aliaj, ni devas konsekvence esti kontraŭ la superrego de unu kulturo super la aliaj. Kaj ni devas konsekvence esti kontraŭ superregaj tendencoj inter socioj. Tie ĉi la diskutoj iamaniere finiĝas kun la precizigo, ke ni kiel esperantistoj estu kontraŭ tiuj sociaj

superregaj tendencoj, kiuj ĉefe tuŝas la lingvan kaj kulturalan aspektojn.

Pri tiaj demandoj oni diskutas en la junulara movado. Estas alia rigardo al la rolo de esperanto, pli vasta, pli aktiva rigardo. La diskuto okazas en la junulara movado, sed ne en la esperanta gazetaro. Kaj estas en la esperanta gazetaro, kie tiu diskuto devus okazi.

Mi opinias, ke tiuj diskutoj estas gravaj, sed aliaj eble ne. Aliaj povas havi alian opinion, povus influi tiun diskuton en alian direkton. Tiu direkto povus esti same bona, eble eĉ pli bona.

Tri roloj de gazeto

Se ni rigardas gazeton kaj la rolon, kiun ĝi havu, ni povas konstati, ke unu rolo por tia gazeto devus esti, ke ĝi estu diskutorgano, ke en ĝi okazu diskutoj pri ideoj, kiuj pravigas esperanton kaj nian movadon. Tiaj diskutoj okazas kelkfoje en la esperanta gazetaro, sed tre limigitaj.

La dua rolo de esperanto-gazeto estus eduka: lingva edukado (plibonigo de la lingvokono), edukado pri argumentado (kiel argumenti por esperanto), edukado pri organizaj demandoj (kiel aranĝi, kiel gvidi).

Ekzistas ankaŭ tria rolo de tia gazeto, kiu estus informa: informi pri tio, kio okazas, pri tio kio okazis kaj okazos. Pri tio, kio okazis/okazas, okazos en la esperanto-movado, sed ankaŭ pri tio, kio okazis/okazas, okazos ekster ĝi. Ĝi enhavu raportojn pri okazajoj, kiam unu lingvo grupo volas regi super alia, kiam unu kulturo malebligas al alia ekzisti. Kiel mi jam antaŭe skribis, tio tuŝas rekte la esperanto-movadon.

Se oni konceptas gazeton kiel gazeton, kiu plenumu tiujn tri rolojn kiujn mi menciis: kiu estu ide-diskuta organo, kiu eduku kaj kiu informu do mi trovas pravigon por komuna gazeto.

Tio povus esti pravigo por kia ajd gazeto. Se ni faros komunan gazeton ĝi devos doni al ni ion pli ol la nunaj gazetoj donas. La ŝanĝo al komuna gazeto estus en si mem sufiĉe komplikita. Ŝanĝi sen scii, ke la ŝanĝo alportos ion novan estus absurde.

La nordlanda komuna gazeto estu: unu el la plej grandaj esperanto-gazetoj. Ĝi aperus en pli ol kvar mil ekzempleroj. Jam nur tio signifus ke li kosto po ekzemplero fariĝus pli malalta — oni eĉ povus havi gazeton kiu aperu pli ofte ol La Espero nun.

Dum nia jarkongreso en Västerås ni verŝajne diskutos tiun ĉi demandon. Pripensu ĝis tiam, kiajn pozitivajn kaj negativajn konsekvencojn komuna gazeto kunportus.

Franko Luin

MAR.-APR. 1972

Numero 2 60-a jaro

ÅRSKONGRESSEN I VÄSTERÅS

Pingsthelgen 20-22 maj



Parti från Svartån.

Som redan i föregående nummer meddelades har Svenska Esperanto-Förbundets årskongress i år förlagts till Västerås. Den livliga industristaden vid Mälaren bör i sig själv locka ett stort antal deltagare — särskilt som staden ju är mycket centralt belägen och lätt att nå från olika håll av vårt land. Skaffa anmälningsblanketter omedelbart (se nedan) och sänd in Din anmälan!

IB SCHLEICHER, den energiske ordföranden i Centra Dana Esperantista Ligo, håller huvudanförandet vid årsmötet på pingstdagen. Ämne: Eфика informado. Föredraget följs av diskussioner i **MINDRE GRUPPER** — detta för att få större bredd på diskussionen och fler deltagare i meningsutbytet. Avslutningsvis kommer en sammanfattande rapportering och slutdiskussion.

SKALL VI HA EN GEMENSAM ESPERANTOTIDSKRIFT FÖR DE NORDISKA LÄNDERNA?

Det blir en av huvudfrågorna vid överläggningarna. Se artikel på annan plats!

KONGRESSENS HÖGTIDLIGA ÖPPNANDE

på pingstaftonen har förlagts till den berömda Rikssalen på Västerås slott. Den efterföljande supén liksom alla arbetssammanträden äger rum på Stadshotellet, där LJK även reserverat rum och övriga måltider för kongressdeltagarna.

PROGRAMMET I ÖVRIGT

Detaljerat program med tidsangivelser kommer i nästa nummer, som beräknas komma ut någon vecka före pingsthelgen. SEF-styrelsen har tänkt sig en delvis annorlunda årskongress i år, med mera tid för överläggningar och diskussioner. Det behöver ju inte hindra att vi ändå kan få tid över för förströelse. Någon längre utflykt är dock inte planerad — men väl ett besök på det berömda Djäkneberget mitt i staden.

ANMÄLNINGAR

Anmälningsblanketter har sänts ut till klubbarna och kan också rekvideras direkt från Svenska Esperanto-Förbundet, Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm.

Om så är nödvändigt går det också att ringa 08-37 27 00 (dagtid) eller 08-52 76 67 (kvälltid), Ragnar Hjorth.

Anmälan måste vara SEF tillhanda senast den 30 april. Efter den dagen kan hotellrum inte längre garanteras.

PRISER

Deltagaravgift	25:—
„ (SEJU-medlem)	10:—
Kongresspaket, innefattande 2 övernattningar på Stadshotellet, frukost 2 dagar, supé pingstafton, lunch och the-supé pingstdagen:	
dubbelrum, per person ..	134:—
enkelrum	154:—
För dem som inte önskar kongresspaket kostar:	
dubbelrum, per natt och person	30:—
enkelrum, per natt	40:—
frukost	6:50
supé pingstafton	25:—
lunch pingstdagen ...	21:—
the-supé pingstdagen....	15:—

Kongressens postgiro är 50 74 61-2 Esperantokongressen

Adressen är

Svenska Esperanto-Förbundet
Jungfrugatan 30
114 44 Stockholm


som även tillhandahåller anmälningsblanketter och lämnar alla övriga upplysningar.

POSTSTÄMPEL

Brev som postas i en särskild brevlåda under SEF:s årskongress i Västerås kommer att stämplas med en speciell poststämpel.

Om du vill ha ett brev med den stämpeln — eller sända ett brev till någon du känner — och inte själv har möjlighet att posta det under årskongressen, gör så här:

Sänd 1 kr till Svenska Esperanto-Förbundet, Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm (postgiro 50 74 61-2 Esperanto-kongressen) och meddela vilken adress som skall stå på kuvertet. Men gör beställn. före 5 maj.



Kongressen öppnas i Rikssalen på Västerås slott.

RECENZOJ

Alberto Fernández: SENGENAJ DIALOGOJ. Popularsciencia esploro de fundamentaj demandoj. Eldonis STAFETO. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö, krj 31:50 inkl. imposto.

Verkado de tia libro estas laŭdinda servo al la scienco kaj al la publiko. En nia intensa epoko la scienco evoluis ja eksplode, kaj la ĝisnuna rezulto de la esplorado ne povas esti signata per la pala vorto "interesa" — ĝi estas vere sensacia. Nia mondo montriĝas mirinde komplika, ĉiu detalo dependas de alia; solvo de speciala problemo starigas novan. Ĉio indikas ian Tuton, regata de rigora reguleco. Unu post alia la plej frapaj hipotezoj konfirmiĝas. La fantaziaĵo de hodiaŭ estos morgaŭ vero.

Bedaŭrinde nur ke la raportoĵi pri la progresado tre malrapide aŭ certarilate tute ne atingas al la publiko. Necesas ke la individuo ekkonu la sciencajn konkerojn por adaptigi siajn pensmanieron kaj vivkoncepton al novaj faktoroj. Generale mankas al la eksterfaka publiko klare komprenebla informado.

Tamen progresas ankaŭ tiu afero. Okazas nun kelkfoje ke sciencisto en konvena kaj eĉ amuza maniero konigas la rezultojn de sia penado. Malaperas la konata bildo de sciencisto kun barboplena vizaĝo, gravmiena kun sulka frunto. Oni konstatas ke la moderna "profesoro" estas tute normala kaj ĝenerala homo, ofte eĉ sprita kaj ŝercema. Sed li konservas sian seriozan, honestan sintenon al la celo de la esplorado.

En preskaŭ faŭsta maniero la scienco vokis minacan fantomon sur la scenejon de la mondo. Krizaj faktoj kaj eblecoj emas ribeli kontraŭ la naturo kaj la vivo. Ni ne scias ĉu eblas daŭre kontroli la evoluon, ĉu la fantomo fariĝos demono... La plej kuraĝa kaj fantazia fikcionovelo restas jam pala imitado de la moderna scienco. Granda vizio konturiĝas malantaŭ la kulisoj. Nia nuntempa alĥemio provas — kaj principe jam sukcesis — esti artefaritan, "vivan" substancon. Sisteme oni laboras pri tiu tasko kaj samtempe oni asertas, ke la naturo laboras hazarde kaj senplane kaj tamen jam antaŭ nekompreneble longa tempo atingis la saman rezulton. Oni asertas ke la natura evoluo okazas nur pro hazarda "selekto" de eblecoj kaj ecoj konvenaj. Kiu estas "la naturo"? Ĉu eblas kombini selekton kun hazardo? Ĉu eblas selekti sen plano? Ĉu ne tiel ĉio fariĝas sensenca, eĉ la scienco mem — "sen plano"?

Tamen oni havas impreson ke, spite al klara logiko kaj frape evidentaj

analogioj, la sciencia vidkapablo ankoraŭ en nia tempo atingas nur nazpintan distancon. Spite al la mirigaj progresoj la sektoro de scio estas ankoraŭ ege mallarĝa. Ĉu ĝi ampleksas ankoraŭ 35 gradojn, ĉu nur 5? Neniu scias, ne konante la tuton. Per eleganta gesto oni sentronigas Dion, sed volonte kaj dankeme oni uzas neknotatan konstanton kiel cementon inter la brikoj de la fiziko — la vivon. Kaj kuraĝe oni asertas "... simpla fakto, ke la vivo estas nur materia". Ĉu ne iom frue? Jam oni opinias ke la scienco ne bezonas hipotezon pri ia Dio, trovas nek rolon nek restaĵojn por Li en la sistemo. Tamen certaj sciencistoj havas tute kontraŭan koncepton tiurilate. Neniu scias ĉu science bazita jes aŭ ne en tiu granda problemo entute eblas. Nia jarcento spertis jam mirigajn malkovrojn, sed prefere ni preparu nin por kia ajn neatendita sensacio en proksima estonteco.

Nun pri la libro. Tre grava kaj necesa verko. Ĝi meritas ĉian sukceson. Klara, nelaciga stilo, flua lingvo, talenta prezentado. Simpla, efika komprenigo de komplikaj aferoj. Dank al Dio (Ho, pardonon!) konsternigaj, matematikaj rebusoj forestas. Sentime kiu ajn povas gaje ataki la libron kaj kompreni ĝin. Prefere ankaŭ faru tion — vi nepre ŝuldas tion al vi mem, krome vi spertos kelkajn horojn de agrabla plezuro.

Sen teda uverturo la verkisto jam en la unuaj frazoj de la dialogo atakas la temojn kun siaj junaj genevoj Dubinja kaj Pensuto. Kun plezuro oni sekvas la simpatian kaj kompreneble sciencon interparolon, kaj la gaja trio nutras la intereson ĝis la fino. Ŝerco kaj sprito faciligas la legadon kaj neniel malhelpas la komprenon aŭ atencas kontraŭ la serioza intenco de la verkisto. La dialoga tekniko estas vere efika metodo komprenigi komplikajn. Eĉ la ebleco de limigita universo aperas simpla...

Ne kredante pri Dio la verkisto tamen kelkfoje vokas lian kontraŭulon por helpo en esprima embaraso. Se nelogike, tamen homece... kaj kompreneble tio estas ja modernismo! Tamen la dialogoj estus eĉ pli senĝenaj sen tio.

La problemoj de nomoj denove aperas: "Neŭtono" anstataŭ **Newton** tro similas al **neŭtrono** k. t. p. "Kritika" stato de eksplodonta stelo, prefere **kriza**. "El tiu observado naskiĝis la naturleĝo" devus teksti **evidentiĝis**. Kaj Broglie estas nomata "Kreinto" de la Ondo-Mekaniko. Eĉ sen tio li certe meritis sian nobelpremion. "Spino" estas jam dufoje antaŭe sciencia termino. Prefere oni uzu ion alian por difini elektronan rotacion, kvankam la esprimo estas sankciita en PV. Kaj "pintfizika" ne komprenigas la celatan sencon. Fenomeno "preter" la mondo devas esti **apud**. "Fandilo" estas io tute alia ol elektra sekurigo.

"Harpenra" tekniko certe ne estus sukceso por frizistino, do **-koloriga**. "Demografia" eksplodo, malĝusta esprimo. "Signifaj" malamikoj, estu **gravaj**. "Komence la organismoj estas simplaj, rudimentaj..." Neeble. Rudimento estiĝas pro regreso el pli evoluinta stato. "Demandoj" anstataŭ problemoj k. t. p.

La supraj rimarkoj ja neniel reduktas la valoron de la libro, sed ĉar temas pri sciencia verko ili estas nepre farendaj. Bonege tiu verko plenumas sian taskon kaj meritas esti tradukata en naciajn lingvojn. Verŝajne simila verko ĉie mankas.

S. A. J.

LIBROJ RICEVITAJ

NEFORGESEBLAJ TAGOJ, de ĝeneralo Vo Nguyen Giap, Fremdlingva Eldonejo, Hanojo (1971). 194 p.

METODIKO DE LA ESPERANTA INSTRUADO, de Rudolf Rakuša, eldonita de Mladinska Knjiga, Ljubljana (1970). 189 p.

MI ESTAS PELĖ, de Edson Arantes do Nascimento (membiografio de futbalistelo), el la portugala de Francisko Almada, eldonita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio-de-Janeiro (1971). 164 p.

EN SYNTAX FÖR DATAMASKINELL ANALYS AV ESPERANTO, de Siv Sjögren, eldonita de Försvarets Forskningsanstalt (FOA P Rapport C 8264-11(64), Stockholm (1970). 44 p.

LA TUTA ESPERANTO — Gramatiko por progresintoj — Gvidilo por kursestroj, de Henrik Seppik, eldonita de Bulgara Esperantista Asocio. Sofia 1971. 180 p.

KONTAKTO KRESKAS

La junulara revuo "Kontakto", eldonata de la junulara sekcio de UEA, vekis lastatempe iom da diskutoj per sia pritrakto de politikaj temoj. Ŝajnas, tamen, ke la polemiko efikis kiel reklamo, ĉar la nombro de abonantoj forte kreskis ĉi-jare. "Kontakto" aperas 4-foje jare, po 20 paĝoj, kaj jam de unu jaro estas kompostata kaj fotografata en la Centra Oficejo de UEA, same kiel la aliaj asociaj eldonaĵoj.

Amika kunestado
en
Bela naturo
Jen
FROSTAVALEN

HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO. Tri'a kajero. Vilnius 1971.

Atingis nin jam la tria kajero de tiu eldonaĵo de "Esperanto Sekcio en Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj". La litovaj esperantistoj estas gratulindaj: tiu ĉi kajero estas lingve kaj enhave same altkvalita kiel la du antaŭaj. El la enhavo ni nur menciuj artikolon pri la malhela somero 1941, kiam eksplodis la milito inter Sovetio kaj Germanujo, artikolon de A. Vaitilavičius pri "Riĉeco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj" (daŭrigo el la dua kajero), tradukitan novelon de Algirdas Pocius kaj du paĝojn dediĉitajn al la 75-jara jubileo de nia konata estona esperantista poetino Hilda Dresen. B. Kärt rakontas pri la naskiĝtaga festo en la hejmo de la poetino. Eĉ la estona televido ŝin atentis kaj intervjuis ŝin.

En la kajero aperas kelkaj elektitaj poemoj de Hilda Dresen kaj kvankam jam pasis preskaŭ unu jaro de post la jubilea tago (en majo 1971) La Espero, aliĝante al la gratulantoj, publikigas ĉi-apude unu el la plej konataj poemoj de Hilda Dresen.

obo


HILDA DRESEN

Juniperoj

*Juniperoj, juniperoj,
sur ŝtonoza firma grund'.
Verdaj pingloj, nigraj beroj
svarmas ĉie en abund'.*

*Multon vi al ni instruas
pri modesto kaj persist,
vane vin ventbatoj skuas:
vi ne plendos pri l'ekzist'.*

*Kaj vi brulas, kaj vi brulas
keraketante kaj kun ard',
al brulad eĉ nin stimulas
sen bezito kaj singard'.*



AKTIVULO EN SOVETIO

Tiu ĉi junulo nomiĝas Jan Prizerovskij kaj loĝas en Ĉernigov en Ukrainjo. Li studas ĉe la altlernejo tie kaj tre aktive kaj entuziasme laboras por Esperanto. La loka grupo havas dekon da membroj. La intereso por Esperanto kreskas en Sovet-Unio, sed la manko de lernolibroj — kaj de esperantolibroj entute — estas tre granda. Malfacilaĵo estas ankaŭ, ke nur limigita nombro da presejoj kapablas presi laŭ okcidenta alfabeto. Jan Prizerovskij tial danke akceptas aŭ interŝanĝas esperantajn librojn. La adreso: Poste Restante, Ĉernigov, Ukrainjo, SSSR.

(Informis J. H. B., Göteborg)

Sven Jerring honora membro de la esperantoklubo de Norrköping

Dum la tempo de 18-a de jan. ĝis 9-a de febr. 1972 la esperantoklubo de Norrköping povis noti ĝojigan atenton pri Esperanto en sia urbo.

En la nova urba biblioteko oni starigis vere allogan, modernan ekspozicion, kiu efektive donis puŝon antaŭen por nia afero. En la vespero la 18-an de jan. estis oficiala inaŭguro kaj poste publika informado pri esperanto. La tre aktiva ĉefbibliotekisto Plaenge-Jakobson antaŭ sufiĉe granda publiko en la enira halo, kie situas speciala ekspozicia ejo, per tre laŭdaj kaj simpatie saĝaj vortoj deklaris la ekspozicion malfermita. Poste oni kolektiĝis en apuda aktivejo, kie la prezidanto de la klubo, Nils Johansson, povis bonvenigi multnombrian publikon, i. a. plurajn anojn de la biblioteka estraro kaj reprezentantojn de la lokaj gazetoj... Surbendita, triminuta parolado kaj saluto de redaktoro Sven Jerring, Sveriges Radio, surprizis la ĉeestantojn kaj kaŭzis longedaŭran, spontanegan aplaŭdon. Kiel ĉefa parolanto-informanto nun aperis s-ano Lennart Åberg el Gotenburgo. En sia enkondukita parolado li prezentis la internacian lingvon kaj atentigis pri la vere granda, ĉiutage kreskanta, bezono

de tiu amikeca komunikilo inter homoj, inter nacioj. Li ankaŭ iom demonstraciis la lingvon, ĝian genialan konstruon kaj logikon. Panelo, konsistanta el jenaj pli malpli konataj esperantistoj; Curt Alf, Olle Anderberg (altlerneja instruisto, regajnitata batalanto por nia ideo), Nils Johansson kaj Leander Tell, diversmaniere donis provojn pri la taŭgeco de esperanto kaj tiel helpis al s-ano Åberg doni respondojn je vigla demando de la publiko. Post la kunveno kaj dum la daŭro de la ekspozicio sin anoncis 25-o da komencantoj, plejparte junaj. Unu grupon gvidas Leander Tell en la urba biblioteko, alian Nils Johansson en la nova studhejmo de la klubo.

La 26-an de januaro la klubo jarkunvenis. Oni kun ĝojo konstatis ke optimismo kaj nova, freŝa vento portas la kluban laboron. Unuanime oni decidis inviti redaktoron Sven Jerring esti honora membro de la klubo samtempe sendante al li dankon pro liaj tre favoraj eldiroj pri esperanto kaj pri interesaj rakontoj pri spertoj kiel esperantisto. Sven Jerring eklerenis esperanton dum la studjaroj en Norrköping kaj aktive laboris kamarade kun Leander Tell. Tri tagojn post la jarkunveno red. Jerring letere

Glöm ej . . .

UEA-avgiften för 1972 Postgirokonton 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö. Kr. 43: — för både årsbok och tidn. Esperanto.

NE HEZITU

Ek al Frostavallen en 1972

kun danko akceptis la ĝojigan honoron.

Parto de la menciita ekspozicio, dank' al la intereso kaj bona helpo de ĉefbibliotekisto Plaenge-Jakobson poste povis esti montrata ankaŭ en la norda biblioteka filio de Ö. Eneby, bonvole oni ankaŭ permesis ke speciala reklamkolono restu ankoraŭ kelkajn semajnojn en la enireja halo. Tre bone kaj favore la lokaj gazetoj skribis pri ĉi tiuj aktivajoj en Norrköping; unu el la gazetaj redaktoroj eĉ aliĝis kaj partoprenas en komenca grupo.

N-o

La plano por la konstruado de la granda piramido de Cheops

aŭ

LA KVADRATURO DE LA CIRKLO

De Lehel Repits, Svedujo. (Esperantigis Eugeno)

Introdukcio de la tradukinto

Laŭ Plena Vortaro de Esperanto la kvadrato de la cirklo estas la tipo de nesolvebla problemo. Jen ĉitajo el sveda enciklopedio: La problemo konstrui per cirkolo kaj liniilo kvadraton kies areo egalas al tiu de certa cirklo okupis kaj fakulojn kaj fuŝulojn dum pasintaj miljaroj. 1882 germana matematikisto sukcesis montri ke la problemo estas nesolvebla per matematika kalkulado.

La supra aserto estas verŝajne vera se oni atakas la problemon laŭ ordinarij matematikaj tezoj aŭ se oni provas fari la geometrian konstruon per mezuroj bazitaj je la decimala distancosistemo.

Sed kio okazus se oni uzus nur aprobitajn geometriajn funkciojn anstataŭ la decimalan distanc-sistemon — do proporciojn laŭ pure geometria konstruo? Ekzemple: Dividu arbitre longan linion per cirkelo en 8 egale longajn partojn. Ĉiun parton de la linio oni povas nomi unuon aŭ la grafikan esprimon de la valoro unu. La tuta distanco signifas 8 aŭ signas la grafikan esprimon de la valoro 8. Oni povas ankaŭ nomi la partojn egalajn proporciojn de la tuta linio, ĉu ne?

La supra rezonado naskiĝis en mia cerbo kiam mi legis la sekvantan citaĵon en la menciita enciklopedio:

— Oni povas diri ke la tuto de la matematiko samtempe formas honoran monumenton pri la genieco de la homaro, sed oni devas ankaŭ memori ke ĝi montras la limitecon de la homa intelekto. La naturo mem laboras sen matematiko, sed ni ne povas kompreni la naturon sen uzo de la matematiko.

Eble vi demandas kial mi skribas pri tiu ĉi nesolvebla problemo. La kaŭzo estas jena: Antaŭ nelonge mi legis verkaĵon de viro kiu dum kelkaj jaroj studis la misterojn de "la granda piramido", aŭ la piramido de Cheops. Dum la esplorado li trovis ke la "nesolvebla" problemo estis solvita jam en prahistoria tempo. Provente la pratempan instrukcion li trovis ke la problemo pri la kvadrato de la cirklo estas tre facile solvebla kaj ke la solvo baziĝas je tiu geometria sistemo laŭ kiu la nauro mem laboras.

La natura nombrosistemo

Per sia transiro al la decimala sistemo ankaŭ la angloj konfesis ke la decimala sistemo estas praktika kaj facile uzebla. Sed la sistemo estas relative malpreciza kiam oni postulas ekzaktajn rezultojn en matematika prikalkulo. Ekzemple: Estas matematika fakto ke ekzakta rezulto ne eblas per la decimala sistemo kiam oni dividas 1 per 3. La rezulto fariĝas 0,3333... en senfina vico. La malprava dependas de la nombro de decimaloj, ĉu oni havas dekon, centon aŭ milojn k. t. p. Tial: se oni provas dividi la distancon de unu metro matematike, la rezulto devas esti malprava, sed se oni solvas tiun taskon per cirkolo kaj liniilo la rezulto estas preciza.

*

Jam en antaŭhistoria tempo oni konis la malprecizon de la decimala sistemo, tiam uzata kiel helpilo kiam oni volis prigrandigi aŭ malgrandigi iun objekton. Laŭ egiptologoj, antaŭhistoria tempo estas la tempo 4500—4000 jaroj antaŭ la naskiĝo de Jesuo sed rimarku mi ne celas tiun tempon, ĉar mi scias ke nek dum la THINTA antaŭdinastia tem-


po, nek dum la kvara dinastio (Cheops, Chefren kaj Mykernios) oni posedis sufiĉan scion pri scienco kaj tekniko por konstrui la piramidojn ĉe Giza. Tiuj homoj nur pruntis la piramidojn, kiuj estis konstruataj multe pli frue, laŭ miaj kalkuloj antaŭ pli ol 12 miloj da jaroj. Kial mi opinias tion — jen alia afero kiu postulas specialan artikolon.

*

Per studado de la naturo kaj de geometriaj konstruoj oni trovis ke la naturo mem havas precizan mezursistemon. Tiu sistemo baziĝas je la natura nombrosistemo kaj manifestiĝas en geometria figuro: Triangulo havanta la proporciojn 3—5—7. Vidu bildon A.

*

La nombroj ne elektigis per hazardo, ĉar 3 estas nombro trovata ĉie en la naturo. Ekzemple: Arbo havas foliaron sur la branĉoj kaj en la tero estas la radikoj. La komunikilo inter la du sistemoj estas la trunko. Akvo konsistas el 2 hidrogenaj atomoj kaj unu oksigeno. Daŭrigu la esploradojn kaj vi trovos la sistemon de du samaj kaj unu malsama parto. Krome la nombro kovras tri nom-



Bildo A.


brojn inter 1 kaj 10, do 3, 3 + 3 = 6 kaj 3 + 3 + 3 = 9.

*

5 estas unika nombro kiu, spite al la fakto ke ĝi estas nepara, ĉiam finiĝas dividon per finita decimalfrakcio. Oni povas nomi 5 "la nombro de ekvilibro" kiu same kiel 2 povas dividi iun nombron je la mezo.

*

7 estas la nombro de la dinamiko aŭ la nombro de la eterna ripetado. Ĉiuj nombroj dividataj per 7 ricevas en la decimalfrakcia rezulto post la entjera parto la sekvantajn ciferojn: 124578. Vidu tabelon I. Tie mi dividis per 7 ĉiujn nombrojn inter 1 kaj 7. Kiel vi vidas la decimalfrakcioj konsistas el la supre menciitaj ciferoj, tamen ne en la sama ordo. Alia afero estas tre interesa. Kiam mi adiciis la ciferojn en la decimalfrakcio aperis



Bildo B.

ĉie la rezulto 27, horizontale kaj vertikale. Kiam mi adiciis 27 sesfoje aperis la rezulto 162. Tiu sumo ne estas pardiĝebla per 7. Sed se oni dividas la rezulton de la divido $7 : 7 = 1$ en 27 partojn oni povas skribi la saman valoron kiel $27/27$. T. e. $7 : 7 = 1 = 27/27$. Kiam mi adiciis $27/27$ kun $162/27$ mi ekhavis la rezulton $189/27$ aŭ 7 se oni aperigas la valoron entjere. La nombro 189 estas pare dividebla per ĉiu nombro inter 1 kaj 9, t. e. en la rezulto aperas ĉiam finita decimalfrakcio post la entjera nombro.

*

Ankaŭ la nombro 7 oni povas trovi en la naturo. Antaŭ nelonge mi ekvidis fotojn pri trafo de akvoguto al surfaco post ortangula fallo. Tuj antaŭ la interna moviĝo en la guto finiĝas oni povas vidi ke la akvo en la guto formiĝas kiel seppinta stelo. La formiĝo de la akvo estas pure natura fenomeno, kiun ni povas hodiaŭ vidi dank'al la moderna fototekniko. Vidu bildon B.

La forgesita mezursistemo

Jam en la prahistoria tempo, laŭ mia opinio antaŭ pli ol 12 miloj da jaroj, oni sciis ke la distanco inter la supro de la kapo kaj la laringo normale estas 7:ono de la longeco de la homa korpo. Oni trovis ankaŭ ke tiu mezuro preskaŭ centprocente egalas ĉe kiu ajn homo, ne konsiderante la tutan korpan longecon de la individuoj. Tial oni konstruis geometrian desegnaĵon de la homa korpo, kiu fariĝis 7 kapmezurojn alta. Vidu bildon A. Ĉi-tiun mezuron oni dividis en 189/27 laŭ la supre donita klarigo. Tiu mezuro egalas al 180,000 centimetroj laŭ la metra sistemo. La mezuro estas ankaŭ menciita en la nova testamento. Vidu Apokalipso 21:15—17. El strofo 15: "Kaj mia kunparolanto havis mezurilon, oran vergon, por mezuri la urbon...". El strofo 17: "Kaj li... ulnojn, laŭ mezuro de homo, tio estas, de anĝelo." Ĝi egalas ankaŭ al la longe serĉita metro de la piramido. Plia klarigo pri la absoluta mezuro ne necesas por tiu-ĉi artikolo, ĉar ĝi temas pri la plano por la konstruado de la granda piramido aŭ la kvadrato de la cirklo.

*


En 1880 konstatis la astronomo Piazzi Smith ke laterangulo de la granda piramido estas $51^{\circ} 51' 14''$. Egala angulo en la triangulo 3—5—7 havas la valoron $51^{\circ} 47' 48''$, t.e. la angulo kiu aperas inter la latero 3 kaj linio orta rilate al la latero 7. Evidente tiu astronomo pravis en sia supozo ke la plano por la piramido baziĝas je la kvadrato de la cirklo. Kaj tamen fakuloj deklaris tiun problemon nesolvebla. Trovinte la similecon inter la du rezultoj mi ne volis akcepti la problemon kiel nesolvebla, ĝuste pro la fakto ke la piramidoj ĉe Ĝiza ekzistas, evidente konstruitaj baze je la kvadrato de la cirklo.

*

Unu el la kaŭzoj kial oni ne povis solvi la problemon pli frue estas neglekto pri la fakto ke la cirklo havas kaj surfacon kaj perefieron. Alia kaŭzo estas la kazo ke oni atakis la problemon per cirklo aŭ kvadrato kiu ne baziĝas je la natura mezursistemo.

*

La sekvonta teksto klarigas kiel mi solvis la problemon. Mi ankaŭ scias ke multaj fakuloj diros: An-



Bildo C.

koraŭ unu fuŝulo kiu kredas ke li trovis la solvon de la problemo, jam pruvita nesolvebla. Sed por la dubantoj pri la pravo de mia solvo mi ankaŭ transdonas matematikan klarigon, kiun mi ne faris mem. Matematikisto per komputero difinis la "pi"-valoron de tiu konstruo, t.e. la konstruo laŭ la punktoj 1 ĝis 11 sube. Li uzis la tre konatan tezon de Pythagoras pri ortaj trianguloj, do: La kvadrato de la hipotenuzo egalas la sumon de la kvadratoj de la du aliaj lateroj. La rezulto "pi" = 3,150630189... estas tre interesa ĉar ĝi montras similecon de la natura nombrosistemo.

Do, mi komencas la instruadon. Vidu bildon C.

1. Desegnu arbitre longan linion per liniilo kaj dividu ĝin en 8 egalajn partojn per cirkelo.

2. Turnu la paperon tiel ke la linio staras vertikale. Marku la suban punkton per A kaj la supran per y. El punkto A kalkulu 7 partojn. Marku la finon de la sepa parto per C.

3. El punkto A faru cirkloarkon per cirkelo malfemita je $5/7$ tra linio A-y.

4. El punkto C faru cirkloarkon per cirkelo malfermita je $3/7$.

5. La tranĉpunkton de la cirkloarkoj dekstre de la linio A-y marku per D kaj la maldekstran per B.

6. Per rekta linio kunligu la punktojn B kaj C finante la linion sub punkto A. Kunligu ankaŭ la punktojn C kaj D en sama maniero.

7. Kunligu la punktojn A kaj B, A kaj D per rektaj linioj kiuj finu super punkto C.

8. La ĝisnuna rezulto estas du egalformaj, egalangulaj trianguloj kun proporcioj 3—5—7.

9. El punkto C konstruu cirklon per cirkelo malfermita je $6/7$. Marku per E la tranĉpunkton sub punkto C sur linio A-y.

10. Konstruu horizontalan linion tra punkto E tiom longan ke ĝi tranĉas la plilongigitajn laterojn de proporcio 3 en la trianguloj. Marku la maldekstran tranĉpunkton per F kaj la dekstran per F¹.

11. Kunligu la punktojn F kaj F¹ kaj vi havas mezuron por unu latero en kvadrato kies ekstero egalas al perefierio de cirklo de diametro $2 \times 6/7 = 12/7$.

*

Do, la unua parto de la problemo estas solvita. Ĉar la perefierio egalas laŭ la valoro de "pi" = 3,150630189. Vidu la matematikan klarigon. Bildo D.

Rimarku: Rezulte aperis la plano por la konstruado de la granda piramido. La plano egalas al la granda triangulo C—F—F¹. Ĉi-tiu rezulto estas unu el la plej gravaj en tiu-ĉi konstruo.

Ankaŭ la egaleco de la diversaj surfacoj solveblas per la nun konstruita sistemo.

12. Per arbitre malferma cirkelo oni konstruas rektan linion tra punkto C, ortan rilate al la linio A-y. La linio tranĉu la plilongigitajn liniojn de la lateroj de proporcio 5 en la trianguloj. Marku la maldekstran tranĉpunkton per Z.

13. Per cirkelo malfermita egale al C—Z oni tranĉas la linion A-y sub la punkto C. Marku la tranĉpunkton per Z¹.

14. El punktoj F kaj F¹ desegnu rektajn liniojn tra punkto Z¹. La li-

1 : 7 = 0	1	4	2	8	5	7	=	27
2 : 7 = 0	2	8	5	7	1	4	=	27
3 : 7 = 0	4	2	8	5	7	1	=	27
4 : 7 = 0	5	7	1	4	2	8	=	27
5 : 7 = 0	7	1	4	2	8	5	=	27
6 : 7 = 0	8	5	7	1	4	2	=	27
7 : 7 = 1	0	0	0	0	0	0		
	27	27	27	27	27	27	=	162

$$6/7 + 1/7 = 1 = 162 + 27 = 189$$

Tabelo I.

nioj tranĉu la plilongigitajn laterojn de lateroj 5 en la trianguloj C—B—A kaj C—D—A. Marku la tranĉpunktojn per G kaj G¹ kaj kunligu tiujn per rekta linio.

15. Per cirklo malfermita laŭ C—G faru cirklon el punkto C. La surfaco (areo) de tiu cirklo egalas al la surfaco de kvadrato kies lateroj egalas al la mezuro G—G¹.

*

La solvo de la problemo pri la kvadrato de la cirklo estas nun finpreta. Por tamen definitive adapti la solvon al la primara postulo ke la surfaco de la konstruita kvadrato egalas al tiu de la donita cirklo mi pretigis ankaŭ la malgrandan kvadraton same kiel la grandan per pure geometriaj funkcioj. Mi ne kredas ke tio postulas specialan klarigon.

*

Antaŭ la finigo per matematika klarigo (Vidu bildon D) mi dankas pro via intereso.

Lehel Repits.

*

La supra traduko estas eta parto el la granda laboro de la verkinto. Liaj asertoj ŝajnas al mi same veraj kiel tiuj de la enciklopedio.

Se iu el vi karaj legantoj volas esprimi vian opinion pri la afero, la verkinto danke akceptos vian leteron. Sendu ĝin al jena adreso:

"Eugeno"
Klubo Esperantista
Box 177
S-541 00 Skoevde
Svedujo

Nur Esperantogazetoj havas rajton senpage uzi la materialon de la artikolo. Kondiĉoj: La tuta materialo devas esti publikigata je unu okazo. La verkinto petas anticipan informon de gazeto kiu intencas publikigi la materialon. Post la publikigo la verkinto bezonas tri senpagajn ekzemplerojn por kontrolo. La supra permeso valoras unufojan publikigon. Sendu la kontrolmaterialon al la jena adreso: "Eugeno", Klubo Esperantista, Box 177, S-541 00 Skoevde, Svedujo.

FROSTAVALEN


alvokas vin per altnivela, interesa programo. **Aliĝu!**

Informojn ĉe
Jan Ströme
Amiralsgatan 36
211 55 Malmö

négyszétevel". E tétel valószínűleg ismert volt már a pitagorászi idők előtt /P.Kr.e 580 körül született/.

A 3-5-7 háromszög alapján szerkesztett körnégyzetegyesítésénél szereplő π érték kiszámítása.

$$\begin{aligned} \sqrt{5^2 - h^2} + \sqrt{3^2 - h^2} &= 7 \\ 5^2 - h^2 + 2\sqrt{(5^2 - h^2)(3^2 - h^2)} + 3^2 - h^2 &= 49 \\ 34 - 2h^2 + 2\sqrt{(5^2 - h^2)(3^2 - h^2)} &= 49 \\ 4(5^2 - h^2)(3^2 - h^2) &= 225 + 60h^2 + 4h^4 \\ 4(5^2 \cdot 3^2 - 3^2 \cdot h^2 - 5^2 \cdot h^2 + h^4) &= 225 + 60h^2 + 4h^4 \\ 30^2 - 136h^2 &= 225 + 60h^2 \\ 196h^2 &= 900 - 225 \longrightarrow 196h^2 = 675 \\ 14^2 h^2 &= 675 \quad h = \frac{\sqrt{675}}{14} = \frac{15}{14} \cdot \sqrt{3} \\ \sqrt{\frac{1764 \cdot 675}{196}} &= \sqrt{\frac{1088}{14}} = b = \frac{4}{7} \cdot \sqrt{17} \quad \boxed{6 \times 7 = 42^2 = 1764} \\ a/2 : 6 = h : b &\longrightarrow a : 12 = h : b \longrightarrow a = \frac{h}{b} \cdot 12 \end{aligned}$$



$$a = \frac{\frac{15}{14} \cdot \sqrt{3}}{\frac{4}{7} \cdot \sqrt{17}} \cdot 12 = \frac{15}{14} \cdot \frac{\sqrt{3}}{\sqrt{17}} \cdot 12 = \frac{15}{8} \cdot \frac{\sqrt{3}}{\sqrt{17}} \cdot 12 \quad ; \quad a = \frac{15 \cdot \sqrt{3}}{4 \cdot \sqrt{17}} \cdot 6$$

$$4a = 90 \cdot \frac{\sqrt{3}}{\sqrt{17}}$$

$$6F = 90 \cdot \frac{\sqrt{3}}{\sqrt{17}} - 12\pi \quad F = 15 \cdot \frac{\sqrt{3}}{\sqrt{17}} - 2\pi$$

$$\pi = 7,5 \cdot \frac{\sqrt{3}}{7} = 3,1506301890630150\dots$$

Bildo D.

UEA:s ÅRSBOK UTKOMMEN

Alla direkta medlemmar av UEA har fått den

Tag ett postkort. Undersök först, om det är några fel på adresser, postnummer, tel.nr., riktnr., invån.-antal, stjärnan för förening eller annat. Skriv sedan direkt till Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando, och meddela ändringen.

Gör det nu, annars blir det inte av, innan nästa upplaga göres i ordning. Lita inte på, att någon annan skall göra det, såvitt ej ett särskilt sammanträde på orten kommer till stånd.

SEF

MIN MENING

Något är galet, när orter, där det bevisligen finns esperantister, ja, t. o. m. föreningar, icke kan uppvisa någon UEA-delegat.

Är det ett svårt och betungande uppdrag? Förvisso icke. Årsboken 1972 är nu ute. Reglerna finns på sid. 20. Blanketter hos fru Andrén (adress sista sid.). Sätt igång nu. En icke-UEA-medlem kan nu bli medlem och anmälas som delegat 1973. Finns redan delegat, så öka på med vicedel. Och olika fackdel. Alla intresserade esperantister bör finnas i årsboken. Lycka till!

Jan Ströme

ÖREBRO DANKAS

Lastatempa distrikta kunveno de la esperantistoj en la gubernio de Örebro, Svedujo, decidis donaci al Universala Esperanto-Asocio sumon de 1.000 svedaj kronoj (665 guldenoj) por esprimi "sian" grandan dankemon pro la bona kaj admirinda laboro, kiun UEA faras por la progreso de Esperanto".

RUMANIO

Ni volonte gastigos familion kun 3—5 jara infano, kiu parolas Esperante.

Ni loĝas sur marbordo ĉe la delto de la Danubo.

Ges-oj Alex. Bubu Tausciuc, str. 23 August nr. 39 Sulina, Rumanio.

DANKO

Estimata S-ro Morariu,

Ni ricevis la 6-an numeron de la revuo "La Espero", kiu enhavas vian artikolon pri la Rumana popola kulturo, kiun ni trovis speciale interesa. Ni decidis, ke la artikolo estu sendata, en kopio, al la Instituto de Folkloro, por esti je la dispoŝno de la specialistoj.

Via sincera
(ss) Ioan George
Direktoro en la Rumana
Instituto por Kulturaj Rilatoj
kun Eksterlando

LARMOJ SUR ROKOFLANKO

De Gösta Rosenberg

2-a parto

La virino, vidante sian sukceson, rapide forkuris por konstati, ĉu la fremduloj rimarkis la bestojn. Jes, ili jam staris rigardante. Ili interparolis evidente, kaj kun kontento ŝi baldaŭ konstatis, ke ili komencis kuri kontraŭ la bestojn. Ŝajne la tento ĉestis la cervojn estis tro forta. Neniu restis ĉe la fajro kun la viando.

Nerimarkita, singarde ŝi ŝtelrampis malsupren. Ŝi ne volis montri sin antaŭ ol ŝi venos al la fajro — ili povus ja tro rapide reveni, kaj se ili tiam vidus ŝin... Ŝi povis baldaŭ senti la odoron en la nazo, kaj ŝi fariĝis preskaŭ freneza pro la malsato. Ŝi trovis sin preskaŭ apud la fajro kaj kuntrigis por fari salton kaj preni la viandon, kiam ŝi subite ekvidis figuron, kiu en la sama momento stariĝis ĉe la fajro kaj rigardis ĉirkaŭ si. Estis maljuna virino, la akompanantino de la fremduloj, kiun la sovaĝulino forgesis. Neniu el ili havis tempon denove kaŝi sin. Unu longan sekundon ili staris rigardante unu la alian, plenaj de timo kaj malmamo. Poste ili ĵetis sin ambaŭ kontraŭ sian malamikinon, kaj kun teruraj krioj ili komencis batali proksime de la fajrejo. La maljunulino estis malgranda kompare kun la alia, sed ŝi ne malsatis la lastan tempon, kaj kiam la juna virino direktis fortan baton kontraŭ ŝi per la hakilo, ŝi sukcesis bone eviti ĝin. La senespera sovaĝulino tamen povis peli la maljunulinon pli proksimen al la fajro, kaj tie okazis la fino: la maljunulino ne rimarkis bastonon, stumbliis kaj falis en la flamojn. Ŝi eligis teruran krion, ruliĝis flanken kaj restis sur la tero senkonscia.

La sovaĝulino rapide alkuris kaj prenis grandan pecon da viando, kiu pendis super la fajro, kaj malgrandan poton kun fluidaĵo, kaj kun ĉio tio en la brakoj ŝi turnis por forkuri. Ŝi atingis la arbaron kaj eniris ĝin. Ŝi sentis la varmon de la viando sub la brako, kvazaŭ ĝi estus vivanta korpeto ŝvitanta, kaj ĝi preskaŭ glitis el ŝiaj manoj. Ŝi sentis sin libera, kaj malgraŭ la malsato ŝi pelis sin por kiel eble plej baldaŭ veni al la groto, kiam ŝi subite ekhaltis. Ŝi ekaŭdis krion el la arboj antaŭ si.

Ŝi komprenis, ke estas la du fremduloj. Ili jam vidis ŝin; eble ili rimarkis ŝin, dum ŝi batalis kun la maljuna fremdulino. Ili kriegis ion al ŝi, sed ŝi ne perceptis la sencon de la

RESUMO DE LA TEKSTO APERINTA EN LA ANTAŬA NUMERO:

Tri homoj en boato — du gemaljunuloj kaj unu junulo — albordeĝas ie en la sovaĝejo, faras fajron kaj rostigas viandajn. Ili interparolas pri alia tribo loĝanta en tiu ĉi regiono. La anoj de tiu tribo ne estas homoj — laŭ la gemaljunuloj — ĉar ili ne povas formi verajn vortojn tiel ke oni povas kompreni parolon. "Tial ili estas bestoj, kaj oni povas utiligi ilin kiel servistojn aŭ mortigi ilin."

En groto supre sur la monto loĝas virino de alia tribo kun siaj tri infanoj. Ŝia edzo mortis en batalo antaŭ dek tagoj kaj de timo ŝi ne kuraĝis forlasi la groton por havigi manĝaĵojn al la infanoj. Nun ŝi vidis la homojn kaj la fajron kaj sentis la odoron de la rostata viando, kaj faris desperatan provon. Ŝi forlasis sian kaŝejon kaj atingis la marbordon, proksime al kiu ŝi ekvidis du belajn cervojn. Ŝi sukcesis timigi la bestojn tiel ke ili forkuris eligante teruran krion pro timo.

vortoj: la vortoj, kontraŭe, estis kvazaŭ battoj de vipo sur ŝia korpo, tiel terure ili sonis. Kaj ŝi ne povis respondi je la sama maniero, ĉar ŝi sciis, ke ankaŭ ili nenion komprenos.

Dum tre mallonga momento ĉi tiu penso penetris la cerbon de la sovaĝulino: Kial? Kial oni ne povas kompreni sin? Tiu lingvo, tiuj vortoj sonas, kvazaŭ ili estus voĉoj de demonoj. De malproksime tiuj homoj aspektas tiel afablaj kaj amikaj, kaj oni ne scias, ĉu ili estas de konata aŭ nekonata tribo; kiam oni aŭdas ilin de proksime, ili ŝanĝiĝas; kaj povus kredi, ke ne ili mem parolas, sed demonoj, kiuj faris al si lokon en la korpoj de la homoj.

Kune kun sia familio ŝi estis la sola postvivanto de sia tribo. Nur kun siaj infanoj ŝi povis interkompreniĝi. Se ili mortus, ŝi estus sola en la tuta mondo, sen amikoj, sen parencoj, kiuj povus kompreni ŝiajn vortojn kaj pensojn...

Ŝi pli firme tenis la viandon sub sia brako kaj rigardis la terenon ĉirkaŭ si. Ŝi devis nepre savi sin de la fremduloj, ĉar se ili mortigos ŝin, la infanoj mortos solaj en la groto en la monta deklivo... Ĉie estis arboj kaj densejoj... Tie ŝi vidis grandan arbotrunkon kun truo ĉe la grundo, kaj antaŭ ol la fremduloj vidis ŝin, ŝi kaŝis sin en la interno de la arbotrunko...

La du fremdaj viroj ekhaltis antaŭ la densejo. Ili kliniĝis kaj zorge rigardis la terenon por vidi, ĉu estas

tie piedsignoj. La pli maljuna opiniis, ke ili ne ekzistas, sed la juna diris ke jes, kaj ili komencis preskaŭ disputi, kiam la junulo subite ekvidis la sovaĝulinon inter la arbotrunkoj. Li montaris per sia etendita mano kaj ekkriis:

"Haltu, murdistino! Ni venos por vengĝi!"

Ili sekvis, sed ŝi tuj malaperis. La piedsignoj finiĝis ĉe la trunko de alta arbo kun branĉaro de stranga formo.

Ili haltis antaŭ la truo en la trunko.

"Tiu arbo estas ensorĉita", diris la maljunulo. "Se ŝi estas en la interno de la arbo, ŝi eble estas la sorĉistino, kiu loĝas tie."

La junulo estis de la sama opinio, kaj ili staris sufiĉe longe diskutante kiel aranĝi por puni la sovaĝulinon pro ŝia malbonfaro. Fine la junulo diris:

"Ni bruligu la arbon! Tiel ni venĝos kaj neniigos la sorĉistinon samtempe!"

La maljunulo hezitis komence — la sovaĝulino povis ja esti forta, povoplena sorĉistino, kaj eble ŝi povos utiligi danĝeran sorĉilon kontraŭ ili — sed li tamen fine konsentis, ĉar vere estas ja, ke la fajro povas neniigi sorĉaĵojn.

Ili kolektis sekajn herbojn kaj branĉetojn kaj metis antaŭ la truon; poste ili prenis siajn fajrilojn kaj per komunaj fortoj faris fajron. Tio daŭris sufiĉe longan tempon, sed kiam ili fine staris rigardante sian verkon, la maljunulo diris:

"Eble la sorĉistino faros kontraŭtakon, tial ni ambaŭ devas foriri, dum la fajro mem laboros por ni."

La juna viro fikse rigardis la branĉaron. Li pensis, ke li vidis ion inter la folioj, kiuj ĵus ekmoviĝis, sed ankaŭ li respektis la povon de la "sorĉistino", kaj tial li akompanis sian kamaradon malproksimen, tiel ke la vortoj de la sorĉistino ne povu alveni al ili kaj ilin difekti.

Ŝi baldaŭ perceptis la voĉojn de la fremduloj, kaj timigita de la sono ŝi prenis sin kontraŭ la internan flankon de la arbo. Subite ŝi komprenis, ke ŝiaj piedoj estis videblaj en la mallumo, kaj ŝi komencis grimpi supren por savi sin. Per la manoj ŝi serĉis en la mallumo por trovi apogon, kiam ŝi subite malkovris, ke io troviĝis tie supre de ŝi, io vivanta, kio movis sin, kiam ŝi tuŝis ĝin per la fingroj...

Ŝi ekestis rigida de teruro. Ŝi sidis tute senmova kaj atendis kio okazos. La "alia" ankaŭ ne movis sin; ĝi nur sidis tie, sen ion fari, sen kaŭzi bruon. Ŝi preskaŭ nur sentis la ĉeston de tiu "alia", ĉar ŝi nenion povis vidi en la mallumo.

En tiu momento ŝi ricevis helpon de ekstere, de kie ŝi ne atendis tion. Dum ŝi sidis paralizita de teruro, ŝi

eksentis, ke venis io de malsupre; ĝi atingis ŝian nazon, kaj tuj ŝi komprenis, kio tio estas. Ŝi jam aŭdis, ke la fremduloj okupis sin per io ekstere, sed ŝi ne atentis la aferon, ĉar la timo pro la "alia" deturnis ŝin. Estis evidente, ke ili jam rimarkis, ke ŝi kaŝis sin en la arbo, kaj nun ili intencis mortigi ŝin per fajro. Ŝi jam aŭdis la flamojn krakadi.

La fumo fariĝis pli kaj pli densa, kaj ĝi plenigis ŝian nazon, tiel ke ŝi estis devigata tusi. Guste tiam ŝi aŭdis, ke la "alia" komencis movi sin. Ŝi ekstremis, sed baldaŭ ŝi komprenis, ke ĝi malproksimiĝis supren. Tuj kaptis ŝin la penso: ĉu eble tie estas elvojo ankaŭ por mi? Ŝi atendis iomete, kaj kiam ŝi kredis, ke la "alia" estas for, ŝi komencis grimpi pli supren, kaj post kelka tempo ŝi subite distingis lumon en la senlumeĝo. Goja ŝi daŭrigis, kaj fine ŝi povis meti la nazon en la freŝan aeron por spiri — tio estis tamen en la plej lasta momento, ĉar ŝi estis preskaŭ sufokita, kiam ŝi atingis la senfuman spacon ekster la trunko.

Tre singarde ŝi elŝovis la kapon kaj rigardis la du fremdulojn sur la tero. Ili staris tie rigardante la arbon kaj la trunkon antaŭ si. Fine ili diris ion inter si, ridis malmole kaj foriris. La sovaĝulino spiris iomete pli facile; ŝi komprenis, ke ili ne vidis ŝin mem sed pensis, ke ŝi estas fummortigita en la interno de la arbo kaj nun ili foriros sian vojon.

Ŝi atendis ankoraŭ longan tempon, kaj poste ŝi grimpis malsupren kun la viandopeco kaj la poto sub la brako. Alveninte la grundon ŝi komencis iri en direkto al la groto, kie estis la infanoj. Ŝi devis nun rapidi, ĉar ŝi jam forestis tro longe; baldaŭ la suno subiros. Baldaŭ ankaŭ ne restos brulŝtupoj por la fajro en la groto, kaj poste venos la sovaĝaj bestoj de la arbaro kaj forprenos ŝian lastan esperon en la mondo...

Ŝi forlasis la arbaron kaj komencis laboreme grimpi supren laŭ la deklivo.

Ŝi alvenis jam al la malfermaĵo de la groto, kie ŝi faris halton por spiri. Ŝi sentis sin tre laca. Ŝi ekmarŝis denove, kaj kun la viando kaj la poto en la manoj ŝi eniris la groton.

Ŝi ekhaltis tuj kaj kun peza koro rigardis la internon de sia malgranda hejmo. La fajro estis elbrulinta. Eĉ ne unu el la brulŝtupoj restis ĉe la fajro, evidente la infanoj bruligis ilin ĉiujn.

La infanoj mem kuŝis senmovaj. Neniu el ili provis movi sin por bonvenigi sian patrinon. La plej granda kuŝis apud la fajro, kun unu mano etendita, kvazaŭ ŝi volus varmigi ĝin. La du aliaj infanoj troviĝis ĉe ŝiaj piedoj. Verŝajne ili kuŝigis sin tie

Ŝi amis kaj majstris nian lingvon

MAGDA BOHMAN-CARLSSON

ORIGINALO

ŜLOSILLOJ

*Pardonu, se mi nun demandas stulte
kaj tute sen pretendo de subtilo:
Ĉu, kiel mi, vi pensis ne tre multe
pri objektet' simbola, la ŝlosilo?*

*Vi havas hejmon kun serur' patenta.
Mi havis iam. Tie sol', trankvilo
salutis min post labortag' fermenta,
feliĉan instruistinon, por azilo.*

*Sed mia kor', ĉi arda kaj pasia,
laŭtempe iĝis ribelema ilo.
Nun oni flegas min en hejm' alia,
nun mankas propra hejmo kaj — ŝlosilo.*

*Sed tamen — jen tintanta fask' orĉene!
Apertas foje iu nobla koro
donace sin por mi. Vi glimas treme,
ŝlosilbuket' el sortĉizita oro...*

*Finbatalinte mian vivoŝtormon
mi h e j m e n bastos. Por ŝlosil' uzota
Di-Patro fajlis ame ĝustan formon
el ruste krudaj najloj de Golgota.*

por ricevi protekton de sia plej aĝa fratino...

La sovaĝulino ne bezonis tuŝi ilin por konstati, ĉu ili vivas aŭ ne. Ŝi ekiris, kaj en la radioj de la subiranta suno ŝi sidiĝis ekster la groto kaj rigardis la sunon, kiu ruliĝis malsupren por atingi la horizonton.

Kiam la lastaj, ruĝetaj radioj de la suno atingis la vizaĝon de la malfeliĉa virino, ili renkontis du larmojn, kiuj falis el la okulanguloj kaj trovis sian vojon malsupren laŭ la sulkoj de la vangoj. Ili estis kvazaŭ pluvogutoj sur rokoflanko, kiuj malsekigas la ŝtonon sed ne ŝanĝas ĝin. La vizaĝo de la virino restis tute senmova, dum ŝi kun vangoj malsekaj de larmoj rigardis la sunon, ĝis ĝi fine forruliĝis en la maron.

FINO.
Originale verkita de
Gösta Rosenberg

TRADUKO

La okuloj de l'viro

de Hjalmar GULLBERG

*Malsupren turnitaj
estas viraj okuloj
en deklivoj vitaj,
de l'sun'rostitaj —
kiel blue malbelaj,
pezaj vinberoj,
teron fidelaj.*

*Malsupren turnitaj
estas viraj okuloj
en la ermitaj
skribohoroj,
post lensoj helpemaj,
pro litermaso
dolorplenaj.*

*Malsupren turnitaj
estas viraj okuloj
al okuloj ekscitaj
en la amnokto,
sur lit' de pasio,
dum li sin dromigas
en sia virino.*

*Supren turnitaj
estas viraj okuloj,
solan fojon, hezitaĵ,
streĉe larĝegaj,
por krevi fine
antaŭ la kaŝo
ĉerkosine.*

Anmälningsblankett till Västerås

får du från

S E F

Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm

Du kan också fråga
din klubb!

**KOMENTARIO AL LA PROGRAMO
EN "SVERIGES UNGRADIO"
LA 711030**

La linioj de Märta Andreasson en la lasta numero de "La Espero" donas al la legantoj la impreson, ke ĉio estas bona kaj nenio kritikinda en la programero.

La knabinoj estas admirindaj kaj dankindaj pro la iniciato kaj tio, kion ili atingis. Rimarkinde estas KE la programero ebligis; io, kio bedaŭrinde malsukcesis al la plej multaj aktivaj esperantistoj, kiuj provis influi al la Sveda Radio.

Kontraŭe oni povus, el esperantista vidpunkto, kritiki KIEL la knabinoj "administris sian funton":

Intermiksi muzikajn kaj parolajn erojn estas bona kutimo, sed la proporcioj estis eraraj: 11,5 minutoj parolado entute en duonhora informprogramo! Kia misuzo de valorega tempo!

El ĉiuj muzikaj eroj, kiuj plenigis la restantan programtempon, preskaŭ 12 minutojn postulis muziko SEN iu ajn rilato al Esperanto! La "esperanta muzikaro" certe ne estas granda; tamen oni povus trovi sufiĉe por plenigi ankoraŭ 12 minutojn!

Krome, sendi tiom longajn muzikajn erojn estas nekonvene. La aŭskultanto forgesas, pri kio la programo temas!

La plej granda eraro, mi pensas, estis je la komenco, kiam, post 15 sek. enkonduko, oni dum preskaŭ kvar minutoj ludis indianan muzikon (SEN esperanta rilato). Pli ol unu aŭskultanto certe havis la impreson, ke estis iu teknika eraro en la kontrolĉambro, kaj ke oni metis la diskon por plenigi paŭzon.

Se oni vere ne havis pli da dirindaĵoj estus pli bone mallongigi la programon je dek minutoj.

Krome, la knabinoj (aŭ iu plenkreska gvidanto) atentu ilian parolmanieron: por personoj, ne alkutimitaj al la iomete atakeme rapidaj vortkaskadoj de la okcident-marbordaj dialektoj, certe ne estis facile sekvi la parolatan (= legatan) tekston.

Se alifoje venos ebleco uzi iun ajn programtempon ĉe la Sveda Radio aŭ Televido, oni pli bone planu kaj utiligu ĝin.

Kaj Stridell

En La Espero nro 6/1971 aperis 10-linia informo pri la gejunula programo pri Esperanto en la Sveda Radio. Tiu artikoleto nek laŭdas nek kritikas la programon, nur konstatas ke ĝi okazis, kaj Märta Andreasson ne respondecas pri ĝi. Kaj Stridell verŝajne celas artikolon kiu aperis en iu alia gazeto.

Persone mi opinias, ke la programo estis bona kaj ke multaj gejunuloj restis ĉe la radioaparatoj ĝuste ĉar ĝi enhavis tiom da ĉarma muziko inter mallongaj informaj partoj.

Sed kompreneble troviĝas diversaj opinioj pri kiel fari tiajn programojn, kaj ni volonte publikigas la vidpunktojn de Kaj Stridell, ĉar ili certe meritas seriozan konsideron. Mi kredas ke nek Märta Andreasson nek ŝiaj junaj adeptoj ĉagreniĝos pro iom da kritiko; ĝi estas pli bona ol indifirenta silento.

Ake Blomberg

**JARKUNVENO DE DANAJ
ESPERANTISTOJ**

La jarkunveno de danaj esperantistoj okazos la 6an kaj 7an de majo en HOTELO DANIO en Silkeborg. Silkeborg situas en tre bela regiono en Jutlando, la plej granda rivero GUDENAËN trafluas la urbon, kaj ne estas longa distanco inter la kunvenejo kaj lago kaj arbaro. Eksterlandaj gesamideanoj estas bonvenaj partopreni la aranĝon kaj pasigi interesan semajnfino inter amikoj kaj interŝanĝi spertojn, diskuti esperantistajn aferojn kaj solvendajn problemojn. Skribu kaj petu detalajn informojn kaj programon. Lasta dato por aliĝo estas la 10a de aprilo.

Silkeborg-Esp-Klubo

Chr Hesel, Drejøvej 14
DK-8600 Silkeborg
Danmark

GEA VARBAS APOGANTOJN

Germana Esperanto-Asocio, la landa asocio de UEA en la Federacia Respubliko Germanujo, fondis apartan juran institucion, al kiu povas aliĝi ĉiu persono aŭ firma, kiu apogas la klopodojn por la Internacia Lingvo sed kiu ne nepre mem scipovas ĝin. La nova instanco, fondita la 20an de aŭgusto 1971, havas la titolon "Ludwig-Zamenhof-Gesellschaft" (Societo Ludoviko Zamenhof). La celo estas varbi subtenon de politikistoj, aliaj eminentuloj de la publika vivo, komercaj firmoj kaj ĉiuj aliaj simpatiantoj, kiuj pretas iel kontribui sed ial ne havas la eblecon mem lerni kaj uzi la lingvon.

Similaj eblecoj jam ekzistas en kelkaj aliaj landoj, ekzemple en Aŭstrujo kaj en Vjetnama Demokratia Respubliko.

MOVIGANTA KONGRESO

Post la universala kongreso en 1970 okazis en la Mediteranea Maro moviganta kongreso, kiu montriĝis esti granda sukceso.

Pro tio naskiĝis la ideo okazigi similan renkonton surmare inter Göteborg, Amsterdam, Immingham, Göteborg.

Por efektiviĝi ĉi tiun ideon ni ne bezonas organizan komitaton, ĉar la TOR-LINE prizorgas regulan veturadon inter ĉi tiuj urboj. Pro la cirkloforma trajekto la partoprenanto revenas aŭtomate en la haveno, kie li komencis la vojaĝon. Tiu vojaĝo ebligas al la esperantisto

- a) partopreni internacian rondon
- b) ĉeesti kun siaj korespondantoj dum la vojaĝo
- c) renkonti siajn korespondantojn dum la restado en la haveno
- d) elekti la plej konvenan daton, ĉar la vojaĝo okazas plurfoje.

Por detalaj informoj vi petu la broŝuron en Esperanto ĉe la TOR-LINE en Göteborg, Immingham, Amsterdam aŭ kiu ajn vojaĝagentejo.

Tiu ĉi aranĝo okazas interkonsente kun Monda Turismo.

**HELSINGÖR
1972**

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos en La Internacia Altlernejo de Helsingör (tute moderna) dum la semajno 23—30 de julio (tuj antaŭ Frostavallen). Venu por ĝui vere interesan ferio-semajnon inter samideanoj el multaj landoj!

Prospekto senpage havebla ĉu

L. FRIIS

Ingemannsvej 9

DK-8230 Abyhøj, Danlando

NI SERĈAS RECENZISTOJN!

La Espero bezonas pli da recenzistoj. Geesperantistoj kiuj havas eblecon recenzi librojn (kelkfoje ankaŭ gazetojn) estas petataj kontakti tuj kun la redaktoro. La recenzinto rajtas konservi por si mem la recenzitan ekzempleron.

Ideologiaj ŝanĝoj en la Esperantomovado

En la junula organo KONTAKTO nro 3/1971 aperis teksto de referaĵo, kiun faris Peter G. Forster dum la 12-a Internacia Seminario de la Germana Esperanto-Junularo en Kolonjo.

Dro Forster estas 27-jara brita sociologo, kiu estas jam konata pro siaj sociologiaj studoj pri la Esperantomovado. En Britujo ĵus aperis lia grava verko "Esperanto kiel socia kaj lingva movado".

La artikolo en KONTAKTO estas tiel interesa, ke ni volas konigi ĝin ankaŭ al tiuj el niaj legantoj, kiuj ne jam vidis ĝin. Ni dividis ĝin en du partojn, unuavice ĉar ĝi postulus tro da spaco en unu sola numero, dua-vice ĉar ni pensas ke estas nur utile, se niaj legantoj studos kaj pripensos tiun unuan duonon ĝis aperos — en la sekvonta numero — la dua kaj fina parto.

Pro la karaktero de la ideologio, la Esperanto-Movado varbas ĉiam el tre diversspeca homamaso. Tio necesas por movado, kiu celas provizi duan lingvon al ĉiuj; kaj Zamenhof bone konsciis, kiam li eldonis la **Unuan Libron**, ke unu el la plej malfacilaj problemoj por la esperantistoj estos la popularigo de la lingvo. Pro tio la **Unua Libro** surhavis la devizon: "Por ke lingvo estu universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia."

La problemoj en la rilato inter la movado kaj la pli vasta socio estas aparte grandaj por la Esperantomovado, pro ĝiaj internaciaj celoj. Por ke Esperanto estu efektive uzinda, ĝi devas esti uzata inter malsamlingvanoj. La diversaj lingvokomunumoj troviĝas plejparte en apartaj nacioj, do la "pli vasta socio" en kiu kampañas la Esperantomovado estas socie tre diversspeca. Plie, la Esperantomovado ne kontentigas per la disvastigado de nura lingvo; ankaŭ ĝi okupiĝas pri idealo. Krom la praktikajn uzojn de la lingvo, la Esperantomovado apogas gentan interakordon, mondfratecon kaj pacon. La fakto, ke la Esperantomovado havas en sia ideologio tiun idealan flankon, kaj ke ĝi konsideras Esperanton parte aŭ plejparte kiel rimedon por tiuj celoj, neeviteble forpelas la subtenon fare de tiuj personoj kiuj, kvankam konsentante kun la ideo de la lingvo Esperanto, ne konsentas kun la ideala flanko de la movado. Aliflanke, aliaj personoj ne subtenos Esperanton, se ĝi havas nenium celon pli altan ol la disvastigado de nura lingvo. La ideala flanko havas delikatajn politikajn konsekvencojn en kelkaj landoj. Kelkaj landoj plene kontraŭstaras gentan aŭ nacian egalecon. Aliaj opiniis, ke la monda superrego de ilia propra ideologio estus la sola

rimedo por mondfrateco kaj mond-paco. La internacie organizita Esperantomovado devas peni kontentigi multajn diversajn tendencojn.

Sed la Esperantomovado ne povas celi tutan harmonion kun la pli vasta socio. Ĉiu socia movado devas havi ian minimuman celdifinon. Movado havus absolute nenium kialon, se ĝiaj celoj tute akordas kun tiuj de ĉiuj personoj en la pli vasta socio. La fakto, ke socia movado por iu celo ekzistas, indikas, ke en la pli vasta socio iuj homoj kontraŭstaras aŭ almenaŭ malatentas tiun celon. Ankaŭ ni devas ne supozii, ke movado probable estos des pli forta, ju pli ĝiaj celoj plaĉas al la nemovadanoj kaj al la pli vasta socio ĝenerale.

Reformemaj sociaj movadoj karaktere subtenas deviajn normojn aŭ valorojn, kaj kontraŭstaras kelkajn aspektojn de la regantaj normoj aŭ valoroj. Ju pli fortaj estas la regantaj neakcepteblaj normoj aŭ valoroj, des pli multe gravas, laŭ multaj homoj, ke oni kontraŭstaru ilin. Tiamaniere fundamentema religia sekto povas flori en sekularizita socio; pacmovado povas flori en militema socio. La cirkonstancojn en la pli vasta socio, inter kiuj Zamenhof elpensis Esperanton, oni apenaŭ nomus 'cirkonstancoj favoraj al Esperanto', se oni supozos, ke favora sinteno al la ideologio de Esperanto en la pli vasta socio estas antaŭbezono por la ekzisto de la movado. La difino de la koncepto "socio" gravas ĉi tie. Sociologie unu el la plej interesaj trajtoj de la universala Esperantomovado estas ĝia mondsocia perspektivo. La ideologio de la Esperantomovado ŝanĝiĝis dum la jaroj: tio okazis unuflanke pro ŝanĝoj en la pli vasta mondsocio, kaj aliflanke pro evoluo tia, kiu okazas en ĉiuj sociaj movadoj.

Firman starigon de sia ideologio atingis la Esperantomovado nur post dudek jaroj; kaj dum tiuj dudek jaroj apenaŭ ekzistis vera "movado". Tiel unue esplorenda estas la kreskado de la ideologio de Esperanto. Sed tuj kiam fondiĝis difinita ideologio, komencis fortoj de ŝanĝo, kiuj ĉiam poste daŭris. La punkto, je kiu oni formulis kaj publike deklaris la difinitan ideologion, okazis en la kadro de la Unua Universala Kongreso en Boulogne. Eĉ tie ŝanĝfortoj ekokazis. La ideologio esprimita de Zamenhof en la malferma parolado grave malsimilis al tiu esprimita en la Deklaracio de Boulogne antaŭ la fino de tiu sama kongreso.

Antaŭ ol plue diskuti, necesas difini la vorton "ideologio". Tiu vorto estas uzata en pluraj sencoj, eĉ de sociologoj. Mi uzas vorton laŭ la difino de C. Wendell King:

"Pli ol nur deklarante ĝiajn celojn, la ideologio de movado ampleksas la plejparton de tio, kio esence estas ĝia

kulturo. Ĝi skribita, ĉu neskribita, ĝi enhavas la pravigon de la ekzisto de la movado, la valorojn kaj idealojn kiujn ĝi prizorgas, la normojn kiujn sekvas la partoprenanto, ofte indikon de la sankcioj por tiuj normoj. Kutime estas ankaŭ negativa doktrino, indikanta tion, kion kontraŭstaras la movado. Tiuj negativaj starpunktoj povas rilati al difinitaj grupoj aŭ individuoj, aŭ, de tempo al tempo, al abstraktaĵoj, kiel 'malbono' aŭ 'malriĉeco'. Eble la ideologio estos detale priskribita aŭ aliflanke estos reprezentita en vastaj propozicioj kiuj lasas multon al dedukto kaj neesprimita kompreno. Ĉiuokaze ĝi estas, simile al la konstitucio de ŝtato, la fonto el kiu movado devenigas sian kialon, doktrinon, evoluon, kaj disciplinan principaron."

La esperantista popolo estas rimarkinde literaturema, kaj diversspecaj skribitaj dokumentoj estis la ĉefa fonto por la ideologio de Esperanto; sed kongresparoladoj ankaŭ estis tre influaj antaŭ ol ili enpresigis. Dum la lastatempa evoluo de la universala Esperantomovado, tiu ideologio skribiĝis en oficialajn dokumentojn, precipe en la statuton de Universala Esperanto-Asocio. Sed eĉ kiam la statuto jam formuliĝis, artikoloj en oficialaj gazetoj ankoraŭ restas grava fonto kaj indiko de ideologia ŝanĝo. En la frua periodo de la Esperantomovado, ĝis la fondo de UEA, ne ekzistis oficiala fonto de la ideologio de la Esperantomovado, kaj ni devas fidi al deklaroj de Zamenhof, al deklaroj de aliaj elstaraj esperantistoj, kaj al eldonita literaturo, poezio kaj prozo.

La strukturo de la Esperanta lingvo mem estas parto de la ideologio de la Esperantomovado. La Esperantomovado okupiĝas unuflanke pri la disvastigo de lingvo; kaj ŝanĝo en la strukturo de tiu lingvo estus ŝanĝo en la ideologio de la movado. Ni povas apartigi la unuan periodon de la historio de la movado, dum kiu oni plejparte diskutis lingvajn demandojn kaj eblajn lingvajn ŝanĝojn. Tiu periodo komenciĝis ĉe la eldono de la **Unua Libro**, kaj daŭris ĝis la Bulonja Kongreso.

Dum la unua periodo oni formulis la lingvan ideologion de la movado, kaj la tendenco estis al konservemo. En 1894, Zamenhof organizis baloton pri la reforma demando, kaj oni voĉdonis forte kontraŭ la proponitaj reformoj. La movado perdis plurajn eventualajn reformemulojn pro tio, kaj la movado fariĝis malpli alloga al reformemuloj. Aliflanke la allogo de la movado por lingvaj konservemuloj pligrandiĝis. Tiu voĉdonado tamen havis nur moralan aŭtoritaton, kaj la balotrezulto certe ne estis la fino de la reforma debato.

Kune kun la malakcepto de lingva reformigo kreskis la Esperanta literaturo. Tio stabiligis la lingvon, kaj

ŝanĝis la lingvon nur laŭ natura evoluo, kaj tiu ŝanĝmetodo ankoraŭ restas. Tiel, kiam okazis la Bulonja Kongreso, la lingva flanko de la ideologio estis atinginta moralan se ne leĝan definitivigon.

Ne nur okazis lingva kreskado dum la unua periodo de la historio de la Esperanto-movado. Tiuj aspektoj de la ideologio, kiuj implicas "pli ol nura lingvo", fortiĝis, precipe per la Esperanta literaturo. La abonantoj de **La Esperantisto** loĝis plejparte en Ruslando, kie la ideala flanko de la movado havis specialan rilaton al la sociaj cirkonstancoj en tiu periodo. Zamenhof mem konsideris, ke Esperanto estas rimedo al genta akordo, mondfrateco kaj mondpaĉo; kaj en la frua periodo de ĉiuj sociaj movadoj la starpunkto de la fondinto-ĉefo havas grandan influon sur la ideologio de la movado. Sed iuj disputis la zamenhofan emfazon de la ideala flanko. De Beaufront, la tiama leŭtnanto de Zamenhof, kontraŭstaris la internan ideon kaj la idealan flankon ĝenerale. Li opiniis, ke oni konfuzus Esperanton kun pacifismo, kaj pro tio la interna ideo estas danĝera, ĉar ĝi malhelpus registaran apogon por Esperanto.

Jen grava sociologia problemo. Ĉu movado konservu siajn fundamentajn principojn, aŭ ĉu ĝi iom cedu al la pli vasta socio por havigi oficialan apogon kaj popularigon? Ĉiuj sociaj movadoj renkontas tiun problemon. Multaj argumentoj inter la esperantistoj rilatas al tiu punkto, kaj dum la historio de la Esperanto-movado la cedema tendenco iomete kreskis.

La unua periodo en la historio de la Esperanto-movado finiĝas ĉe la Bulonja Kongreso. La malferma parolado de Zamenhof en tiu kongreso estis klara pravigo de la ideala flanko de la movado. La influo de la kongreso, inkluzive de la malferma parolado de Zamenhof, estis grandega por la ideala flanko de la movado, kaj iuj similigis ĝin al la pentekosta donaco de la lingvoj. La kongreso ĝenerale estis triumfo por la starpunkto de Zamenhof, malvenko por la starpunkto de Beaufront. Sed sin trovis malkonsento. La parolado de Zamenhof pritraktis ne nur ĝeneralajn idealojn; ĝi inkluzivis religian sentimenton, kaj enhavis la ĝermon de lia Homanismo. Tio okazigis malkonsenton de romkatolikoj kaj kontraŭreligiuloj en Francio: Bourlet kaj Boirac penis sensukcese persvadi Zamenhofon, ke li elasu la finan preĝon. Fortoj de ŝanĝo jam estis eklaborantaj, kaj ĉe la fino de tiu sama kongreso necesis publikigi la "Deklaracion de Boulogne". Tiu deklaro tute ne menciis la internan ideon, kaj asertis:

"Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas."

Ĝi atentigas pri la neŭtraleco de Esperanto:

"Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas."

La neŭtraleco esprimita en la Deklaracio de Boulogne estis oficiala malkcepto de universala religio kiel elemento en la ideologio de Esperanto. Jen alia cedo: de la ideologio de la fondinto al la tendencoj de la movadoj. Por Zamenhof, la universala religio estis tiel grava, kiel la universala lingvo. Sed multaj influaj movadoj estis katolikaj aŭ kontraŭreligiuloj, kaj tute ne povis akcepti la ideon de universala religio. Kiel en aliaj sociaj movadoj en la Esperanto-movado la ideologio modifiĝis por permesi tiujn tendencojn. Unu distinga trajto de la Esperanto-movado estas, ke ĝi devas permesi tiom da diversaj tendencoj pro sia internacieco.

Ĝis nun mi indikis du cedemajn tendencojn en la Esperanto-movado. La unua rilatas al la pli vasta socio (ekzemple, la opinio de de Beaufront, ke la interna ideo malhelpas oficialigon). La dua rilatas al la tendenco de movadanoj (ekzemple, la zamenhofa cedo pri universala religio). En ambaŭ ekzemploj la Esperanto-movado proponis neŭtralecon por solvi la problemon. Okaze neŭtraleco mem kontraŭstaras la tendencojn de movadanoj. Revolucaj socialistoj argumentas ke vera neŭtraleco ne ekzistas: ĝi samsignifas kun konservemo. Okaze ankaŭ aŭdiĝas malkonsenta voĉo pri la cedo tendenco de UEA rilate ne al politiko aŭ religio, sed al dono de bona impresio al la ekstera publiko. Tipa ekzemplo de tia malkonsento estas la starpunkto de Verdiro, kiu inkluzivas multajn artikolojn pri la Esperanto-movado en sia libro **Elingita glavo**. En artikolo "Frak-esperantistoj" li citas anoncon en kongres-libro:

"En la lastaj kongresoj esperantistoj admirinde observis la admonojn de la LKK., ke ili ne akiru la mokon de la ekstera publiko per portado de fantaziaj vestoj kaj neseriozaj elmontroj de troa fervoro." Kritikante tiun starpunkton, li esprimas la opinion ke

"...ja troviĝas racio en la propono, ke oni restarigu denove veran kongreson de Esperanto, kies bazo estu la renkontiĝo, la re-renkontiĝo, de frat-esperantistoj, ne de frak-esperantistoj."

En tiu ekzemplo, la deziro de la LKK, ke aspekto de la kongresanoj plaĉu al la ekstera publiko, konfliktis kun la tendenco de Verdiro, por kiu "la frako fariĝis la simbola, vesta uniformo de socio, kiu estas tute maldigna kaj unuformeca".

Atentigante al la neŭtraleco de la Esperanto-movado en la kampo de

valororientiĝo, la Deklaracio de Boulogne tamen asertis, ke la movado ne estas neŭtrala, kiam temas pri ŝanĝoj en la lingvo. Ĝi difinis la signifon de la Fundamento, kiu permezas ŝanĝon nur per natura evoluo. Tiu principo daŭris senŝanĝe, sed ne senkontraŭstare, dum la historio de la movado. Kvankam estas debatoj inter la fundamentistoj kaj la neologistoj, ambaŭ partioj akceptas la Fundamenton kiel bazon.

La Deklaracio de Boulogne estas probable la plej grava dokumento publikigita pri la ideologio de la Esperanto-movado dum ĝia tuta historio. Ĝi enkondukas la principon de neŭtraleco, kaj la aŭtoritatecon de la Fundamento. Tiuj du principoj ambaŭ okazigis skismojn: En 1921 Lanti argumentis, ke la Esperanto-movado en la nuna formo estas servanto de la **status quo**; kaj li fondis sian propran Sennaciecan Asocion Tutmondan. En 1908 okazis la Ido-skismo, kaj dum la polemiko rilate al la decido de la delegitaro Cart apelaciis al la Deklaracio de Boulogne kontraŭstarante ĉian ŝanĝon. Sed la Deklaracion de Boulogne oni neniam nuligis, kaj la skismoj nur fortiĝis la ideologion de la neŭtrala Esperanto-movado, ĉar eventualaj reformistoj iris aliloken.

Daŭrigo

INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO

Kiam la fajroanimaj esperantistoj, gesinjoroj Friis en Aabyhøj, Danujo, ree aranĝis kursojn en altlernejo apud Århus la kursmembroj sentis sin feliĉaj havi okazon partopreni. La kursoj daŭris de la deksepa ĝis la dudektria de oktobro 1971. Ni tuj sentis nin kaptitaj de speciala amikeca atmosfero, kiun gesinjoroj Friis sukcesis krei.

Okazis kvar diversaj kursoj, nome por komencantoj, daŭriga kurso, perfektiga kurso kaj kurso por tiuj, kiuj volas instrui esperanton laŭ la moderna Friis-metodo. Sekve ĉiu partoprenanto povis elekti konvenan kurson.

Tri lecionojn ni havis en la antaŭtagmezoj kaj post lunĉo ni faris interesajn ekskursojn sub lerta gvido de s-ro P. Jørgensen.

En la vesperoj estis prelegoj kaj kursanoj montris belajn filmojn kaj lumbildojn.

Dum la finfesto ni ludis skeĉojn, kantis kaj pianoludis. Tre ĉarme kaj belmove s-ino Carli prezentis fajrodancon el Indonezio.

Dagmar Lindroth

FROSTAVALEN
en 1972
por
vi

Horizontale


1. Bonvole tiu organizo gazeton donas pro kotizo.
4. Tiu tre profana papo regas sur grandega mapo.
6. Mallonga vorto ĉu longa sorto?
8. Sekreciaĵo mikskolora. Ĝin kredis oni tre favora por kverel en tempo fora.
11. Ofte debata pri -ota kaj -ata.
13. Se memoro via strikas tiel certe vi praktikas.
15. Pri senc "volonte" klarindike ĉi vorto temas gramatike.
16. Post litomedito hezito kun ŝvito pro cito de mito kaj spito de rito — ĉu spritoimito de fakdelegito?
18. Kombine kun la estradiko kondiĉo bona por komplikoj.
19. Vi tion faru ĉefe juna. La posta temp: ne oportuna.
21. Nun gardu vin, Amoro pafas, kaj ve, se tia pafotrafas.
22. Jen eco malofta de samideano. Rakontis Sten Bergman pri tia japano.
23. En tiu ĉe l'sputnika vojo ne kreskas herbo, nek levkoj.
25. Tia konduko praktikata — bedaŭrinde interŝtata.
28. Helpe de, ĉu ilo, forto, ruzo vorto ĝusta jen por via uzo.
29. En kazo de kaŭzo de io konvenas ĉi prepozicio.
31. Se supren strebas ties pinto, vi estas verva kaplevinto.
32. Se vi al studado jesas, poste tiel vi impresas.
34. Kutimas koro pro pasio. (Kaj same ankaŭ incendio.)
36. Nun temas — ĉu vero? pri sola litero.
37. Se tiel vi kantas, la kanto ne vantas.
38. Nur finaĵo, vortfiktiva. (Absolute adjektiva.)
39. Alvenu tiel, anoj! Beno estus por la klubkunveno.
40. Jen maniero neprezica por solvo de ĉi vorto kriza.

Vertikale

2. Nun montru ĉu kapablo via por ĉi krucvort estas tia.
3. Tio eblas dank al Newton. (Eĉ Einstein konis ne refuton.)
4. Vi tion pro konstanta ĉaso posedas ĉu, eĉ je amaso?
5. Tia estu vi perfekta, ĉu kolektiva aŭ rekta.
6. Koncerne mielon ĝi superas libelon.
7. Konvenas por ganto de praa giganto.
9. Se dormon vi neglektas, ja tiel vi aspektas.
10. Ne sofisto, nek sadisto, sed ofte kun persisto (en tristo).
12. Sent enua, misa grizo. Mankas ĝojo kaj surprizo.
14. Ne taŭgas io tre alia. Precize jenu solvo via.

KRUCVORTENIGMO

de S. A. J.



17. Se kapabla ne por trilo, kantas tamen li kun brilo.
20. Kia vorto senkonscia! Kio estas senco ĝia?
21. Kontribuas al anĉova ĉarmo kaj kunfluas en knabina larmo.
23. De eldonisto kara vorto. Akcelu ĝin per ĉia forto.
24. ... homoj en boato. (Rido rezultato.)
26. Duonon nun dividu per duono ($\frac{1}{2} : \frac{1}{2} =$) (Por tio eĉ necesas ne kraĵono.)
27. Estas grip epidemia — laŭ la nom geografia
29. Multaj al ĉi-tio hastas — mi prefere ĝin prokrastas.
30. Praktiki tion — malfacile. (Atestas malsukcesoj mile.)
33. Admono forta al doloro ke fuĝu ĝi el dent aŭ koro.
35. Ne ĉesu senvola postprove, ĉi vorto admonas: denove.

Sendu vian solvon al la redakcio (Ake Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping) tiel ke ĝi atingu nin antaŭ la fino de aŭgusto 1972. Ni decidis pri tiel longa tempo por ke ankaŭ niaj eksterlandaj legantoj havu eblecon partopreni la konkurson. La sendintoj de la tri unue malfermitaj ĝustaj solvoj ricevos libro-premiojn. La nomoj kaj la ĝusta solvo aperos en numero 5.



— Ĉu okazis komplikajoj ĉe la malsano de via amiko?

— Jes, li enamiĝis al la flegistino kaj lia edzino enamiĝis al la kuracisto.

LÄGRE EXAMEN

Du som är intresserad av att gå upp i lägre examen — kontakta din klubbstyrelse eller SEF, Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm.

Brevmärke - Portland


Hjälp till göra reklam för världskongressen i Portland genom att på all post sätta det vackra brevmärket i tre färger. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:40
3 kartor kr. 3:—

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).



EDITH BODÉN



Fraŭlino Edith Bodén Uppsala, mortis fine de februaro.

Ŝi naskiĝis la 15.4.1880 en Stokholmo, kie ŝi en la Franca Lernejo ricevis sian unuan edukon ĝis la 10-jara aĝo. Post ekzameniĝo en la Instruistina Seminario de Uppsala, en 1898, ŝi komencis sian instruistinan karieron jam kiel 18-jarulino en Lindesberg. Post instruado en Lysekil kaj Hjo, ŝi venis en 1908 al Borlänge por instrui biologion, matematikon kaj la francan lingvon al generacio de mezlernejoj dum preskaŭ 40 jaroj.

Jam en 1927 fraŭlino Bodén partoprenis instruistan kurson por komencantoj de Andreo Cseh en Stokholmo, pli poste daŭrigan kurson de Morariu en Beskowska skolan, ĉe kies rektoro,

Sam Jansson, ŝi faris la superan ekzamenon Esperantan kaj iĝis estrarano de la Sveda Esp. Instituto. Ŝi aranĝis kaj subtenis la organizadon de prelegserioj kaj kursoj de eksterlandaj instruistoj kaj mem gvidis Esp. studrondojn. En sia gastama, harmonia hejmo en Borlänge ŝi ofte akceptis la lokan klubanaron kaj fremdlandajn gesamideanojn. Nia delikatanima samideano ofte moderigis sian centran hejtaparaton, por ke ŝia abunda floraro ne malbonfartu en ŝia hejmo, prefere frostetis ĝia reĝino. Amikino Edith amegis birdetojn, precipe blufrakajn, flav-vestajn paruojn.

Foje okazis, ke ŝia rektoro telefonis al fraŭlino Bodén. Sed ŝi devis interrompi sian paroladon: "Pardonu, Harald, mi devas momenton foriri de la aparato, por forpeli impertinentajn paserojn. Ili forpuŝas la kompatindajn paruojn de la manguojn ĉe la fenestro"...

Dum someraj kursoj en Elsinoro kaj dum Esp. mondkongresoj ŝi estis ŝatata gasto.

Post la pensiigo ŝi revenis al la universitata urbo de sia junaĝo, Uppsala, kie ŝi vigle agadis dum kvarona jarcento kiel aktiva ano de la Esperanto-Klubo, Asocio por Paco kaj Libero, Volontula Virina Grupo, kaj Abstinenca Organizo "Blanka Rubando".

Amikino de ŝi skribis en memorartikolo pri E. B. en "Uppsala Nya Tidning":

"Ŝi neniam uzis la vorton 'laca' kaj per bona humoro ŝi forpuŝis la malagrablaĵojn de la sorto. Oni memoras ŝin kiel gastaman, grandaniman kaj tre pozitivan homon. Ŝi mankegos en nia rondo."

Ŝi ripozu pace!

Io Iu

PORTLAND

Före beställning av logi, utfärder etc. Tag kontakt med fru Ester Andrén, Malmö, för information angående kostnad.

MÄRTA JANNES

Eksinstruistino Märta Jannes, Linköping, mortis la 27-an de januaro. Ŝi restis ĉiam fidela al siaj idealoj. Al la Esperantoklubo de Linköping ŝi apartenis dum kvar jardekoj, kaj kune kun siaj fratinoj ŝi iam montris grandan malavaron al SEF.

KORESPONDI DEZIRAS

La jenaj samideanoj en Bulgario deziras kontaktojn kun vi:

S-ron Georgi Hr. Atanasov, ul. Indshe voivoda No 12 a, Sofia-9.

Teknikisto en instituto higiena. Ludas akordionon kaj kantas vespere en restoracio de la Radio-Televizio Sofia.

Simeon Dimov, ul. Al. Stambolijski 5, Koubrat.

Borislav Petkov, Bulv. "Emil Markov" 125, Sofia-8.

Teknikisto en uzino, kie oni produktas kotonŝtofojn. Edziĝinta. Malnova esperantisto ĉirkaŭ 60-jara Lia skribmaniero estas facile legebla.

Pastro Zdravko Bozadĝiski, V. Barokovo distr., Küstendilsko.

Nova esperantisto. Deziras korespondi kun la tuta mondo.

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

57-a
UNIVERSALA KONGRESO
de Esperanto



29 juli—5 augusti 1972

PORTLAND (Oregon) USA

blir platsen för esperantovärldskongressen 1972. Anmäl Eder redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Pe-ranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningsblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningsblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Hol-land eller USA.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5. Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	Till 31/3 1972	Till 20/6 1972	Efter 20/6 1972
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	165:—	180:—	218:—
2. Kongresano, individua rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ)	143:—	158:—	195:—
3. Kongresano, individua rekta) membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	120:—	135:—	173:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	116:—	126:—	164:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	100:—	111:—	148:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	50:—	54:—	92:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	83:—	90:—	128:—
8. Blindul(in)o	66:—	72:—	110:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningsblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalongen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vdarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej kan betala från eget land) och Adoptaj Gepatroj (för barnkongressen). Givares namn publiceras. Svenskarna bör observera dessa fonder, även om Ni själva ej skall resa till kongressen.

Lämna gärna Ert bidrag.

SEF

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Cefredaktoro: Ake Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 20 sv. kr. (postdeka konto 20 12-3).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—, 1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanono: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO



Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm

Girkonto: 20 12-3

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 25 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr ö. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Kasisto: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Bertil Akerberg, Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten.
Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B, 752 23 Uppsala.
Tel. 018/11 73 09.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7
Ejo: Möllenvångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 ĵaŭde 17.00—18.00

Skrabaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strönne
Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78